
# ?isdatigo por formaligi varojn ricevitajn de internacia kunlaboro




Havano, feb 18 (RHK) La ?enerala Dogano de la Respubliko Kubo publikigis Rezolucion kun la celo ?isdatigi la postulojn kaj kondi?ojn, kiujn oni devas plenumi anta? tiu instanco por la formaligo de la varoj, kiuj alvenas en la landon kadre de la internacia kunlaboro ricevata.

La? la dokumento, la estroj de la agentejoj de la Centra ?tata Administracio, interrilataj korpoj, naciaj esta?oj, pli altaj komercaj administraj organizoj, same kiel la guberniestroj kaj la Urbestro de la speciala municipo de Isla de la Juventud adresas  la aproban dokumenton de koncernataj donacoj al la

Doganestro.

Por promocii pli grandan lertecon en ?i tiu procezo, la teksto difinas, ke la aprob-teksto estas prezentita de la entoj destinitaj por formaligo, en cifereca a? presita formato, kiel parto de la komplementaj dokumentoj de la Deklaro pri Varoj, la? raportoj la ?urnalo Granma.

En la nova rezolucio, la ento destinita por formaligi la Varo-Deklaron prezentas ?in al la kontroldogano, kiel komplementajn dokumentojn, la ?uran Deklaracion, subskribitan de la estro de la kunlabora projekto, kiu atestas, ke la varoj importotaj estas enhavataj en la projektoj de internacia kunlaboro, kiun Kubo ricevas; a? la dokumento, kiu aprobas la koncernan donacon.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/286618-gisdatigo-por-formaligi-varojn-ricevitajn-de-internacia-kunlaboro

**Radio Habana Cuba**